



# nia vivo

BULTENO de la Esperanto-Societo «FRATECO»

Redakcio kaj Administracio: Str. San Vicente de Paul, 1  
ZARAGOZA - 1 (HISPANIO)



**"NIA VIVO"**

**Organo de "Frateco" Esperanta Societo  
San Vicente de Paúl, 1 - Zaragoza**

**Kunordiganto: Antonio Marco Botella**

**Redaktoroj:**

**A. M. Gyarre**

**José Antonio Fleta**

**Francisco-Javier Rodríguez Alvaro**

**E. Piquero**

**A. Lapuerta**

**Presado: Tip. Boloix**

**Reina Fabiola, 7 - Zaragoza - 8**

**Depósito Legal: Z-1756-83**

**Dua Epoko**

**n.º 1 (58)**


**Decembro 1983ª**

**Pri la enhavo de la artikoloj  
respondekas la aŭtoroj mem.**

**Oni permesas represi niajn  
artikolojn se oni mendas  
la aŭtoron kaj la nomon  
de nia organo.**

**Redakcio kaj Administracio:  
Str. San Vicente de Paúl, 1  
Zaragoza - 1**

**Informa Servo de HBF  
kaj de "Frateco":  
Enrique Piquero Vázquez**



## *Angulo de nia Estraro*

## SALUTO KAJ RIGARDO RETROSPEKTIVA

Reaperas "Nia Vivo" post preskaŭ duonjarcento. La lasta numero de la organo de "FRATECO", la 57a, aperis en Junio de 1.936a, kaj estis la intercivitana milito hispana, kiu tute ne permesis la aperigon de la Julia numero. Sporade, aperis specialaj ekzempleroj por memorigi la 50an kaj 7an datrevenon de la fondo de nia Societo. Historie kaj sente, ni konsideras, ke ni ne povas prokrasti ĝian reaperon...

La vivo de "FRATECO" dum tiu longa periodo sen nia organo, estis varia: kelkfoje sukcesa kaj esperiga, aliffoje tute kontraŭe, ofte eĉ ekstreme delikata, tio ĉiam dependis de la politika landa situacio kaj la elstareco kaj fervoro de la personoj kiuj en tiuj momentoj gvidis nian Centron, sed oni povas certigi en ĉiuj kazoj, ke nia kolektiva vivo estis ĉiam malfacila, precipe ekonomie, same kiel estis ankaŭ malfacila la plua ekzistado de ĉiu kultura Societo en nia lando kiu iel ne estis subvenciata, kaj, kompreneble, ni ne povus esti escepto. Se mi devus substreki tiujn reliefajn momentojn aŭ jarojn, mi citus kiel terure krizajn, tiujn nigrajn kaj longajn monatojn dum kaj postmilitaj, ekde 1.936a ĝis 1.948a, kiam nia ekzisto estis vere en danĝero; kaj kiel plej sukcesajn, la jarojn 1.949an kiam "FRATECO" renaskiĝis kiel nova feniksa birdo, la 1.954an kiam selekta grupo de gejunuloj, kuraĝe kaj talente, organizis la XVan Hispanan Kongreson de Esperanto en Zaragozo, la 1.967an-1.968an kiam du eminentaj gezaragozanoj organizis la 28an Hispanan Kongreson en Zaragozo kaj la 53an Universalan Kongreson de U.E.A. en Madrido efike helpate de nia kolektivo, fine la jarojn 1.979an-1.983an kiam kunordigita laboro de kelkaj membroj de nia Socie-

to sukcesis organizi en nia Cent. Ĉiujarajn Seminariojn, instituci-  
igis diversajn kulturajn aranĝojn kiuj kulminis en la okazigo de alt-  
nivela hispana Kongreso, kiu solidare cmaĝis niajn veteranojn okaze de  
la 75a datreveno de la fondo de "FRATECO".

Sed kvankam gravaj, ĉar sukcesoj kaj fiaskoj ĉiam havas lernindajn  
leciojn, ni ne povas nek devas halti en la narcisisma rigardo de  
nia propra pasinto, ĉar certe oni ne povas vivi nur el nostalgio, jen  
kial ni preparis por la nuna jaro, aktualan laborprogramon por nia -  
Societo, kiu komencis esti realo dum la nuna Lernojaro, t.e. en monato  
Oktobro: Kursoj, ĉiusemajna Seminario, Ekspozicioj, Renkontiĝoj, kunvenoj  
k.t.p., kaj kun tiu densa programo ankaŭ la reapero de nia organo, kiu  
devas servi kiel ponto: de nia pasinto kaj nia hodiaŭ, de nia Societo  
kun la aliaj, ĉu hispanaj ĉu eksterlandaj, ĉar gravas, eble pli urĝe ho-  
diaŭ ol iam antaŭe, ke ni kontaktu kun aliaj homoj de nia terglobo, ke  
ni komuniku unu la alian pri niaj aspiroj, niaj sociaj kaj homamaj opi-  
nioj, niaj porpacaj streboj... La reapero de "Nia Vivo" devas signi-  
fi signon de vivanteco kaj optimismo ĝuste kiam "FRATECO" estas 75-ja-  
ra, ĉar ni devas kontribui skui nian Socion pri la reala danĝero kiun -  
travivas nun la homaro.

Ni konscias pri la malfacilo de nia tasko por atingi altnivelan  
bultenon en Esperanto, ĉar vere niaj redaktoroj ne estas "sonoraj" emi-  
nentuloj aŭ profesiuloj de la plumo, ni ja nur posedas entuziasmon kaj  
bonan intencon grandadoze, kaj ni racie dubas ĉu tio estos sufiĉa por -  
nia pretendo, tamen nia decido estas firma kaj ne facile cedos antaŭ -  
eventualaj malhelpoj. La periodeco de ĝia apero rekte dependos de la -  
kunlaborado de nia anaro kaj ankaŭ kaj precipe de nia ekonomio, fakte ni  
dezirus ke la redaktado de nia bulteno estu kolektiva entrepreno iluzia  
precipe de gejunuloj, kiuj jam montris sian entuziasmon por la afero.

Ni profitas la okazon por saluti niajn legantojn kaj speciale la  
membrojn de "FRATECO", kaj peti al ĉiuj ili, kunlaboradon kaj solidaran  
helpon. "Nia Vivo" povas esti dum tiu ĉi etapo kiu komenciĝas hodiaŭ, li-  
gilo neanstataŭigebla kaj efika kunigonta nin pli firme, kaj sentimentala  
le por niaj veteranoj, la revenon de certa amiko intima.

# Arkivo de Aragonio

## LA NOVA POPOLDEFENDANTO KAJ LA ANTIKVA JUĜESTRO\*

Antaŭ ne longe, la hispana Parlamento, aprobis nomumon de Jura homo kiel Popoldefendanto, figuro reprezentante institucion kreitan de nia Konstitucio, kiu, dependa de la Parlamento mem, celas revizi la agadon de la ŝtata administraj rilate al la administratoj, defendi la fundamentajn rajtojn kaj liberecojn de la individuoj kiam ili estas domaĝitaj, kaj garanti la ĝustan aplikadon de certaj leĝoj en difinitaj kazoj.

Estas tiu moderna figuro, kiu de antaŭ ne longe jam funkcias - en diversaj okcidentaj landoj demokrate regataj; sed ĉu ĝi kaj la institucio kiun ĝi reprezentas estas tiel moderna? En Hispanujo tute ne, ĉar simila figuro jam aperis en Aragonio en la 12a jarcento - sub la nomo de Juĝestro, kies tiama celo unua estis, zorgi ke la verdiktoj de la reĝo kaj gravuloj estu sub leĝa formo ĝuste faritaj. Verŝajne, tiu figuro devenis de tiu de la kortumjuĝisto de la Mezepoko, kaj iom post iom ĝi akiris pli kaj pli grandan influon kaj gravecon ĝis transformiĝo, dum la 13a jarcento, en interpretiston de la rajtoj kaj privilegia leĝaro de Aragonio.

La persona prestiĝo de la aragonaj Juĝestroj dum la 13a kaj 14a jarcentoj, kontribuis plifortigi la institucion, kaj estis en la jaro 1348a kiam la Zaragozaj Kortesoj kompletigis ĝin ĉar ili konsentis - ke la Juĝestro estu la sola interpretisto de la privilegia leĝaro de Aragonio, kaj samtempe juĝisto de la kontraŭjura problemaro kaj rekta aplikado de ties leĝoj, kio ebligis al ili, efike helpate de konsilantaro, decidi pri la leĝeco de la verdiktoj kaj ĝusta uzo de ties leĝaro. Por ebligi tiun celon, la Juĝestro, disponis du esencajn juĝrajtojn: la rajtsubskribon, kiu ebligis ĉesigi la procesojn de iu ajn - tribunalo, kaj la manifestacian proceson, kiu ebligis al li, sub peto de la interesito, protekti personojn aŭ procesojn kiam oni konjektis ke ili povus esti viktimoj de maljusto, aŭ kiam oni suspektis pri ne ĝusta aplikado de la aragoniaj leĝprivilegioj. Por plifaciligi tiun taskon, la Juĝestro disponis apartajn elementojn kiuj ebligis al li

certan sendependecon kaj apartiĝon de la dinara juĝoservo: kelkaj kunlaborantoj specife dediĉitaj al tiu ofico, kaj speciala karcero kiu ŝirmis la procesatojn de eblaj persekutoj, maljustaj premoj, aŭ nedezirataj venĝoj, kiuj fakte povus malhelpi la ĝustan agadon de tiu Jura aparato.

La Juĝestro nur respondecis antaŭ la Zaragozaj Korteso, kiuj ŝarĝis specialan Konsilantaron per aŭtoritato kaj kompetenteco, kio fakte - signifis por la Juĝestro, plenan sendependecon rilate al la reĝa povo, kaj se al tiu faktoro oni aldonas la honestan konduton kiun li ordinare sekvis, facile oni povas kompreni la prestiĝon kiun dum jarcentoj akiris tiu figuro kaj lia institucio.

La historio de la Juĝestroj de Aragonio dum almenaŭ ses - jarcentoj, estas ja interesa kaj oni povas konsideri ĝin kiel politike grandinflua, sed nia intenco ne estas paroli hodiaŭ pri tiuj - eventoj, sed strikte pri ilia institucio, ĝuste kiam analoga al tiu, estas ŝtatigitaj nun en Hispanujo kiel demokratana novaĵon.

Tiu aragonia institucio, leĝe malaperis dum la 18a jarcento, kvankam fakte nur teorie funkciis ekde la jaro 1591a, kiam la reĝo Filipo la 2a kontrolis ĝin ordoninte la senkapigon de la Juĝestro Juan de Lanuza, okaze de grava agitado en Aragonio, kiam tiu ĉi pretendis protekti la reĝan sekretarion Antonio Pérez, kontraŭ la volo kaj la kolero de la propra reĝo.

La reapero de tiu figuro de la Jura historio de Aragonio en la hispana politika scenejo kiel garantio de la homaj rajtoj kaj liberecoj, estas sendube paŝo antaŭa je la ŝtatigo de pli justa kaj demokratana Socio.

!Goje ni salutas la novan Popoldefendanton!!

MARKUS

## Bonvolu ridi ... sed ne tro



Du ŝercemaj amikoj, veraj troemuloj, konversacias pri siaj respektivaj - korpkapabloj, kaj unu diras al la - alia: -Mia vidpovo estas tiel granda ke ĝi atingas eĉ pli ol teleskopo.- -Nun mi vidas kulon estantan supre, sur la turo Ĝiraldo.- La alia troemulo respondas: -Vere mi admiras - vin, ĉar fakte mi ne kapablas vidi - tion kiom vi, sed tamen mi tre klare aŭdas ĝian zumadon.

---

Kolokvo inter amindumantoj :

Ŝi:-Do vi asertas ke se mi rifuzas vian amon vi tuj mortigos vin mem, ĉu ne?

Li:-Jes mia kara, en tiuj kazoj mi kutimas ĉiam fari tion!

---

Ori parolas pri ŝtelistoj, kaj unu el la interparolantoj emfazas la influon de la kinejo en la lernado de ŝtelaj metodoj. Alia interparolanto, tute sincere intervenis en la konversacio kaj konfesis:-Ho, jes, ofte oni lernas tro, ĉar lastan ssmajnon, promenante, mi glitis sur la trotuaro, kaj junulo, tre ĝentile, helpis min restari. Post kelkaj minutoj mi rimarkis ke mi ne kunportis mian biletujon. Rapide mi kuris ĝis mi retrovis la helpeman junulon, kaj en tute minacenta tono mi diris al li: !Rapidu, donu al mi la biletujon! La junulo surprizite obeis.

Trankvile kaj kontenta mi revenis al mia hejmo, kaj en mia ĉambro mi vidis mian biletujon antaŭe forgesitan en mia hejmo.

---

Geedzoj diskutas ĉar li, akompaninte ŝin ĝis la pordo de Kliniko kie ŝi devos akuŝi, estis devigata lasi ŝin dum momento por parki la aŭtomobilon, sed tiel malbonŝance ke kiam li revenis en la Klinikon ŝi jan estis akuŝinta. Post la riproĉoj de la edzino, li diris al ŝi ko-

lera: Nu, la proksiman fojon ja vi iros parki la aŭtomobilon!!

-.-.-

Sinjoro kiu emas rakonti siajn "bataletojn", en amika rondo rakontas unu el tiuj aventuroj: Foje, en Afriko, mi renkontis leonon; ĉar mi ne kunportis en tiu momento armilon, mi uzis heroan rimedon: mi sidiĝis kaj rigardis ĝin fikse.-

-Kaj kio okazis?- Mi tute ne scias. Kelkfoje mi pensas, ĉu tio okazis ĉar mi sidiĝis sur tre altan branĉon de arbo.

-.-.-

Konversacias du ŝercemaj troemuloj, skoto kaj andaluzo, kaj la unua diras al la alia: -Estas miriga kio okazas en niaj antikvaj skotaj -kasteloj ĉar se vi krias en ili la eĥo respondas vian demandon tute klare kaj kohere.-

-Nu, mi bone komprenas tion, diris la andaluzo, ĉar kiam mi pasas -apud Ĝiraldo nokte, se mi krias, la eĥo respondas al mi ĉiam: -Fartu bone, sinjoro, ĝis revido!

-.-.-

Du sinjoroj konversacias en trajno, dum longa vojaĝo, pri siaj respektivaj filoj, kaj unu el ili demandas la alian:

-Ĉu vi havas filon?- Certe sinjoro, mi havas unu.

-Ĉu li estas bona filo?- Jes, li estas tre bona.-

-Ĉu li fumas?- Ho ne! En sia vivo li neniam prenis cigaron.-

-Almenaŭ li vizitas kafejojn, ĉu ne?- Ne, sinjoro, li neniam iras en kafejon.- Mi gratulas vin.- Ĉu li ankaŭ ne eliras nokte? -Ne,

tuj post kiam li finas la vespermanĝon li iras dormi.-

-Sinjoro, vi havas ja bonegan filon, denove mi gratulas vin.-

-Sinjoro, ĉu vi povas diri al mi kiom aĝa li estas?.

-Jes sinjoro, li estas dujara.

-.-.-

Dialogo inter frenezuloj:

-Mi estas la reĝo, ĉar Dio diris al mi tion.-

-Atentu, mia kara, ĉar mi diris al vi nenion!!



## denove franca-hispana renkontiĝo



Hispanaj kaj francaj geesperantistoj renkontiĝis plian fojon, en la franca bela urbo Pau. Efektive, je la fino de Septembro, modele organizite de la Turisma HEF-Sekcio, aŭtobuso de "fratecanoj" ekveturis de Zaragozo por renkonti niajn francajn najbarojn.

Sabaton frumatene, ni eliris el nia urbo, kaj tuj ni ĝuis la unuan vojaĝplezuron: vidi belan ektagiĝon en la alta montaro de nia Pireneo. Estis ja mirinda spektaklo, precipe por tiuj kiuj kiel ni loĝas en granda urbo, kaj pro tio forgesas tiun belegan eksplodon de koloroj, la puran frumatenan aeron, kaj la perspektivon de horizontoj ŝanĝiĝantaj kiuj vaporiĝas en la hela mateno...

Unu el la ĉefaj celoj de nia Renkontiĝo estis, doni la nomon de D-ro. Zamenhof al bela parko de la urbo Pau, kaj ĝuste tion ni faris tuj post nia alveno: francaj kaj hispanaj esperantistoj kunvenis en tiu bela parko, kaj plezure aŭdis la brilan paroladon de la Representanto de la Urbestro, kiu emfazis la homaman esencon de Esperanto, kaj akcentis la paceman idealismon de la esperantistoj, precipe hodiaŭ, kiam la homo suferas tiom da agresoj ĉiutage. Oni malkovris artan tabulon kun la nomo de nia Majstro, kaj liberigo de kolomboj briligis tiun memorindaĵon.

Tuj poste, ni vizitis la Esperantan Ekspozicion en la Socia - Centro Pepinière: interesa Ekspozicio, kaj tre afabla etoso en tiu loko, kie ni tre plaĉe matenmanĝis, kaj tute amikeme konversaciis - kaj konversaciis kun niaj francaj geamikoj.

Dimanĉe, en la Urbodomo de Pau, ni estis akceptitaj de la Ur-

bestro, elstara persono kiu samtempe estas ŝtatministro. Li alparolis nin tute afable kaj simpatie, kaj promesis sian kunlaboradon al ni por nia afero, kaj tuj sekve regalas nin, francaj kaj hispanaj geesperantistoj, per frandaĵoj kaj delikata franca vino.

Poste, niaj francaj geamikoj, akompanis nin viziti la urbon, kaj fininte la viziton ili venis kun ni ĝis tute proksime al la landlimo, sed antaŭ nia disiĝo, la urbestro de bela vilaĝo el valo de Bern, amiko de la organizinto de la Renkontiĝo samideano Decovert, invitis nin gustumi bongustan fromaĝon kaj specialan vinon de tiu Regiono.

Mi tute ne povas fini mian kroniketon ne esprimante nian sinceran dankon al niaj francaj gesamideanoj, kiuj tiel ĝentile akceptis kaj regalas nin. Kaj ankaŭ tute same, al nia samideanino Inés Gastón, kiu tiom strebis por sukcesigi ĉi tiun memorindan Renkontiĝon.

ANTONIA LAPUERTA

---

"FRATECO" deziras sian anaron kaj ĉiujn hispanajn kaj eksterlandajn esperantistojn kaj amikojn:

!Feliĉan Kristnaskan Feston kaj plej bonan Novan Jaron 1.984a!

---

NOVA GLUMARKO: Okaze de la Jaro pri Universala Komunikado, oni eldonis en Zaragozo novajn glumarkojn. Por aŭtomobiloj: 60 Ptoj.

Per leteroj: 80 Ptoj dek.

Petoj al la Libro-Servo de la Federacio kaj al nia adreso.

---

HISTORIO.- Se vi deziras scii ion pri la historio de la Hispana Esperanta Movado, bonvolu akiri la broŝuron "Kroniko el la historio de "FRATECO" kiu rakontas ankaŭ pli komplete la historion de tiu ĉi Zaragoza Societo.

La Redakcio.

# Lirikaj Paĝoj

*Antonio  
Machado :  
Poeto*



Estis Antonio Machado Ruiz, unu el la plej elstaraj poetoj de nia moderna epoko. Li naskiĝis iun tagon de Julio de la jaro 1.875a en la fama palaco "Dueñas" de Seviljo, ĉefurbo de Andaluzio, kie okazos la 44a HEF-Kongreso la jaro 1.984a. Homo de interna vivo, pensema, melankolia, lia poezio spegulas tiun idealismon de homo honesta kaj pura koro, kiun li tiom amis.

Li edukiĝis en Madrido, en la Instituto pri Libera Instruado kiun gvidis tiu granda pedagogo nomata Giner de los Rios, kaj plurfoje vojaĝis al Parizo, kie li studis Filozofion kun Bergson kaj Biedier. Profesoro de franca lingvo en la Instituto de Soria, li eltrovis tie du motivojn kiuj grave influos en lia poezio: Soria kaj Leonor. En Soria, li eltrovis la plej profundajn esencojn de Kastilio: la simplecon kaj purecon, du vivaspektoj kiujn li alte estimis. En Leonor, li trovis la plej grandan amon de sia vivo. Tiuj du motivoj estas en la medolo de la poezio de Antonio.

Li kunlaboris en la plej gravaj intelektaj revuoj hispanaj, kaj en la jaro 1.907a li publikigis sian unuan verkon "Solecoj" kie li esprimas, jam matura, sian intimisman poezion. En 1.912a li aperigas sian verkon "Kastiliaj Kampoj" kiu definitive montras lian poetan kaj verkistan grandecon. Kaj tuj sekve venis multenombraj aliaj verkoj, inter ili teatraj verkoj, kiujn li kreis kunlabore kun sia frato Manuel.

Dum la intercivitana hispana milito, li restis ĉiam fidela al la Respublika demokratio, kaj kiam ĝi estis venkita li ekziliĝis en

Francjo, kie li estis en koncentrejo, kaj baldaŭ post sia liberiĝo li forpasis en Collioure en la jaro 1.939a.

Antonio Machado, poeto de la "sonoraj solecoj", de la profundaj sentoj melankoliaj, de la intimaj emocioj lirikaj, kiu kantis kiel neniu alia sciis kanti, puran poezion, neniam mortos en la koroj de tiuj kiuj amas purecon en la sentoj. Jen poemo, kiun li dediĉis al alia granda hispana poeto, Juan Ramón Jiménez:

Estis nokto de Majo  
blupala kaj serena.  
Sur cipresa branĉaro  
brilis luno plena.

Lumiganta la fontanon  
el kie akvo sprucadis;  
intertempan ploran kanton  
nur el ĝi oni aŭdis.

Poste, oni perceptis la kanton  
de kaŝita sola najtingalo.  
Rompis skublova vento  
l'akvokurbon de l'fontano.

Kaj melodio ege milda  
tra la ĝardeno vagis,  
estis sonoj intermirtaj  
kiujn violon'vibrigadis.

Estis akorda lamento  
el juneco kaj vera amo,  
por la luno, por la vento,  
por najtingalo kaj por l'akvo.

La ĝardeno havas fontanon  
kaj la fontano himeron,  
voĉo aŭdigis dolore kanton  
animo de bela printempo.

Silentis la voĉo lamenta  
kaj de l'violon'ĝia melodio.  
Restis tra la ĝardeno, vaganta,  
sola kaj trista la poezio.

Kaj nur la fontanon kantantan  
oni aŭdis kun melankolio.

Komentario kaj traduko:

A.M.GAYARRE.

# Kolektante florojn el la penso



Libero estas regi la propran vivon, dependi neniam de alia homo, subordiĝi la vivon nur al la propra volo, kaj neniam agi sub influo de riĉeco.

Platono.

La rekompenco al mensogulo estas, ke oni ne kredas lin, eĉ se li diras veron.

Aristotelo.

La plej granda valoro por la homaro estas, ĝui maksimume la feliĉon ne forprenante tiun de la aliaj.

Huxley.

Ne estas io pli facila ol doni konsilojn, nek pli malfacila ol akcepti ilin. Konsiloj estas tute ne efikaj kiam ili estas ne kontrasteblaj per raciaj ekzemploj.

Lope de Vega.

La avaruloj gardas sian trezoron kvazaŭ ĝi estus absolute ilia, sed ili timas uzi ĝin kvazaŭ ĝi apartenus al aliulo.

Plutarko.

Kiu volas ion, certe atingas ĝin, sed kio estas ja malfacila estas vere voli ion.


Kampano.

Se ekzistas ia sekreto pri la sukceso, ĝi konsistas, en la kapablo prikonsideri la vidpunkton de la aliaj, kaj vidi ĉion samtempe el la propra vidpunkto kaj tiu de aliuloj.

H. Ford.

Modelo pri lakoneco: Iu persa generalo adresis al Lizandro, macedona estro, ĉi tiun mallongan kaj minacan mesaĝon: "Se mi venkas Grekujon, mi buĉigos ĉiujn, forbruligos ĉion. Lizandro, tute trankvile, respondis al li per la jeno, kiu estas ja modelo pri lakona respondo: "Se".

# nia aktuala



## VIVO

**DANKOJ.-** La Prezidanto de "FRATECO" sendis al nia Redakcio noteton por eventuala publikigo en nia organo. Ni tre plezure publikigas ĝin por vi:

"Mi deziras tutkore danki, nome de nia Societo, al ĉiuj personoj, Esperantaj Centroj kaj Oficialaj institucioj, ĉu hispanaj ĉu eksterlandaj, kiuj okaze de la 75a datreveno de la fondo de "FRATECO", helpis nin iel, esprimis al ni bondezirojn, aŭ sendis al ni gratulmesaĝojn, kaj tute same al tiuj gesamideanoj kiuj solidare omaĝis nin kiel simplaj kongresanoj partoprenante la 43an HEF-Kongreson de Zaragozo."

"Koran dankon kaj servoprete restas ĉiam via: Victor Ortiz"

-.-

**NOVAJ KURSOJ.-** Post la somera libertempo, komenciĝis denove la aktivado de "FRATECO": La lernojaro komenciĝis la 17an de Oktobro, kaj en nia sidejo, San Vicente de Paul, 1, oni gvidas jenajn kursojn:

Du por komencantoj, kies instruistoj estas S-roj. José Andrés Aldana kaj Miguel Angel Martin.

Du Perfektigaj, kiujn gvidas S-roj. Angel Saleta kaj D-ro. José Olavide.

-.-

**SEMINARIO.-** La 21an de Oktobro komenciĝis ankaŭ en nia Centro Seminario por lingva praktikado, kiu okazos ĉiuvendrede, tute en Esperanto. La temoj, libere elektitaj sufiĉe antaŭtempe, ebligas, verki unue, kaj dum la kunsido oni ĝin legas, poste oni debatas ĝin tiel amplekse kiel oni konsideras necesa. La temoj ĝis nun pritraktitaj estis:

La 21an Oktobro: "Prezento de la Seminario", de Antonio Marco.

"La Paco" de J. Andres Aldana.

Sekvis interesa kolokvo de ĉiuj la partoprenantoj.

La 28an Oktobro: "Miaj ideoj pri Paco" de A. Marco Botella.

Sekvis kolokvo pri la temo.

La 4an Novembro: "La pacifismo" de A. Marco Botella

Sekvis debato pri la temo.

La 11an Novembro: Komentarioj al la parolado de nia akademiano Juan

Regulo Perez dum la ĉijara Zaragoza Kongreso.

Aranĝoj de Enrique Piquero. Debato pri la temo.

La 18an Novembro: "Naciismo kaj regionaŭtonomioj" de A. Marco.

Pasia debato pri la temo.

La 25an Novembro: "La popoldefendanto" de A. Marco Botella.

Kolokvo pri tiu ĉi aktuala temo.

-.-.-

LOTERIO. - La Administracio de "FRATECO" sciigas al niaj membroj kaj simpatiantoj ke jam oni vendas la Loterion en nia en nia sidejo, kiel profiton, kiel ĉiujare, ni uzas por helpi stopi la breĉon de nia ekonomio, de nia Societa ekonomio. Al la eternaj trankviluloj kiuj - lasas ĝis la lasta momento la akiron de la biletoj, kaj se ne plu restas ili vive protestas, ni ilin avertas, ke se la biletoj elĉerpiĝas jam ne plu estos eble al ni akiri aldonajn kvantojn de sama numero.

-.-.-

EKSPOZICIO KAJ BANKEDO. - La Sekretariejo de nia Societo komunikas al nia anaro ke, la 15an de Decembro, Zamenhofa tago, oni inaŭguros la ĉi jaran Ekspozicion de Libroj en nia sidejo, por ebligi al niaj membroj plenumi la devizon "Aĉetu unu libron ĉiujare, almenaŭ, kaj se eble plurajn". Oni preparas jam novajn stokojn kaj lastajn eldonaĵojn. La kutima bankedo omaĝe al nia Majstro, okazos sabaton, la 17an de Decembro, kaj oni petas la partoprenantojn enskribiĝi kiel eble plej baldaŭ, en nia Sekretariejo, de la sepa kaj duono ĝis la naŭa vespere.

Enrique Piquero.

# poezio hispana - araba

Antikvaj kronikoj rakontas, ke kiam Abul-Abbas venkis en Oriento apud rivero Tigris la dinastion de Banu Umaja, kaj ordonis ekstermi ĝin, iu el la forkurintaj venkitoj, alvenis al Magrebo unue, kaj poste vokite de andaluziaj maŝroj, al Hispanujo, kie li starigis sendependan tronon en Kordovo. Temis pri princo Abd-al-Rahman, kies talento kaj kleraj inklinoj vekis entuziasmon kaj admiron, kaj tuj sekve kreis la adekvatajn kondiĉojn por starigi en Hispanujo fokuson de civilizacio, kiu baldaŭ superis iun ajn ekzistantan tiam en Eŭropo.

Al-Hola rakontas ke, en la palaco de la juna princo (jam Abd-al-Rahman la 1a) oni okazigis festojn pri literaturo kaj oni recitadis versojn; kaj elstaraj poetoj kunvenis en ĝiaj salonoj. La reĝo mem verkis poemojn, kaj unu el ili, verkita de li inspirate de palmo, kiun li mem semis en sia propra korto, diris:

Ho palmo! ci estas kiel mi  
ankaŭ fremda en Okcidento  
malproksima nia tero de ni!  
Cia patrio estas ja Oriento!

Ploru do, sed ci ja muta,  
ne povas plori kun mi:  
ci ne sentas en la koro profunda,  
tiel akre kiel mi sentas ĝin,  
la doloron kiu min turmentas  
tiel longega malproksim'.

Se ci povus senti, ho palmo!  
certa mi estas pri ĝi,  
ke ci plorus amarajn larmojn  
kun sama sento kiel mi.

Kaj tiu palmo pri kiu parolas la princo-poeto, tiam fremda en Okcidento, iom post iom radikis en la hispana grundo, kaj tiel loge kaj fidele sin sentis adaptita kaj identigita al tiu pejzaĝo, ke oni dirus ke en la pratempo ĝi naskiĝis ĉi tie mem: Svelta kaj gracia, la hieratika palmo, estas ja karakteriza elemento de la hispana pejzaĝo en la tuta sudo kaj oriento de nia lando, en intima rilato kun la medio, tiel, ke alia perspektiva formo estas absolute ne imagebla por tiuj pejzaĝoj. Tiu superba kaj eleganta profilo, estis por ĉiam envicigita al la eterna linio de tiuj horizontoj kiel propraj.

Simila simbiozo, okazis en multenombraj aliaj aspektoj de la



kunvivado hispana-araba dum tiuj longaj ok jarcentoj, kiuj evidente atestas, ke estis pli forta kio nin kunigis, ol kio nin disigis: Tiam en Kordovo, oni parolis romancan kaj aratan lingvojn, kaj la kantoj de muezinoj estis aŭdeblaj same kiel la sonoriloj de preĝejoj. Toleremo kreis efektivan intersanĝon de kunvivaĵoj kaj opinioj tre interesan por ambaŭ kolektivoj, kies limoj aperis kiel promesplenaj.

Kaj Poezio ne estis ja escepto: Kun la araboj, elementoj tute novaj invadis la hispanan poezion, alportante al ĝi, abundon da metaforoj supersarĝitaj de bildoj: verbaj ĉarmaj-retorikaj artaĵoj kiuj forte influis la tiaman hispanan poezion, pli racie kaj orde konceptita sed sen tiu fantazio kiun kunportis la araba. Ambaŭ, la hispana kaj araba, miksiĝis en unu sola dum jarcentoj. Distingi kiaj elementoj apartenas al unu aŭ alia, estas esplora tasko kiun mi absolute ne pretendas plenumi.

La poezio hispana-araba, apenaŭ menciita nun de specialistoj, meritas miaopinie, esti disvastigita kiel esprimo de beleco, kaj de epoko kiu disradiis la plej altklasan kulturon kaj pensadon de la civilizita mondo...

Mia pretendo estas, elekti tiujn poemojn kiuj pli plaĉas - al mi, traduki ilin, kelkajn en liberaj versoj, kaj prezenti ilin - al vi laŭ stilo, tempo, materio aŭ skolo tute ne submetita je ia - ajn ordo. Kaj unua ekzemplo povas esti tiu kiun mi hodiaŭ aperigas, tradukitan de mi, tute ne rigore, laŭ mia modesta scio kaj kapablo, - tamen sufiĉa por ke nia legantaro perceptu la ĉarmon kaj fantazion de la tiamaj poetoj.

Jen do poemo, verkita en la lla jarcento de Abu Hassan Ali ben Hisn, kies titolo estas:

#### KOLOMBIDO.-

Tio kio pli perturbis min  
estis surbranĉa kolombido  
kiu inter insuloj de rivero  
briligis en siaj pupiloj  
perlojn en siaj palpebroj  
oron en sia bel' profilo.



Pistakolora estis ĝia koliero,  
ĝia brusto lazurŝtona,  
ĝia kolo stare ŝanĝbrila,  
la dorso kaŝtankolora  
kiel la plumekstremo flugila  
kun rebriloj el la horo ora.

Nigra estis l' akra beko  
kiel argenta kulmo brila  
kiam inka malseka helo  
lumigas ĝiajn velurojn nigrajn.

Ĝi apogis sin sur branĉetaro  
kvazaŭ ĝi estus en komforta trono  
kaj kaŝis sub la flugilfaldo  
la gorĝon, kun obstina zorgo.

Sed kiam ĝi vidis elverŝi  
miajn senesperajn larmojn,  
mia ploro ĝin timigis,  
kaj sur la verda branĉo  
siajn flugilojn ĝi etendis,  
kaj en rapida forflugado  
mian koron forprenis...

Kien ĝi iris?  
Mi volas tion ignori.  
Kiu povas scii,  
kien iras birdo por plori!!

Abu Hassan Ali ben Hisn.  
XIIa jarcento.

Antaŭparolo, traduko kaj versigo de

ANTONIO MARCO BOTELLA

**DEZIRAS KORESPONDADI:**

Kun araboj aŭ kompetentuloj pri antikva kaj moderna poezio.  
Bonvolu skribi: A.M.Gayarre, Av.Compromiso de Caspe, 26.-1<sup>a</sup>.-Dcha.  
Zaragoza-2.

# Junularaj temoj

La 27an de pasinta Oktobro okazis kunveno de la Junulara Konsilio de Zaragozo, kiun partoprenis pluraj Prezidantoj de Junularaj Domoj de nia urbo. Nia samideano Vicente Garces, Zaragoza HEJS-Delegito, proponis la integriĝon de nia Junulara-Fako en tiu urba Konsilio. Unuanime oni akceptis la proponon post aŭdi lin.

Nia samideano, prezentis al la ĉeestantaj Prezidantoj skizon pri la idearo de nia Lingvo Internacia, kiun oni aŭdis kun intereso kaj plaĉo.

Vere transcenda kaj grava por la junularo oni povas konsideri la projekton pri estonta agado prezentitan al ni, de la Delegito de la Zaragoza Urbeŝtaro, laŭ kultura vidpunkto.

Nia impreso pri tiu kunveno estis ja optimisma, ĉar ni konsideras ke la disvastigo de Esperanto en tiuj junularaj medioj estas vere promesplena.

---

VIZITO DE SAMIDEANO.— Vera plezuro estis por ni akcepti en niaj Zaragozaj Junularaj medioj, al nia franca samideano Marcel Redoulez, — kiun ni konis en la Franca-Hispana Renkontiĝo de Pau.

Li partoprenis en unu el niaj Seminarioj de nia Centro, kaj en tute amika etoso ni akompanis lin viziti nian urbon, kaj ĝuis kun li tre bonajn momentojn dum la festotagoj de la Pilar-ferio.

Koran dankon amiko Marcel!

--

INTERNACIA JARO DE LA JUNULARO.— La Junulara Fako de "FRATECO" intencas proponi al la ceteraj hispanaj junularaj Grupoj, prepari aktivan komunan programon okaze de la Internacia Jaro de la Junularo kiun la Unuiĝintaj Nacioj jam proklamis por efektiviĝi en la jaro 1.985a. Niaj junuloj kontaktos kun HEJS por starigi Komisionon kiu preparu la diritan programon, kies projekto povus esti debatita dum la Sevilja HEF-Kongreso. Problemoj kiel la senlaboreco de la junularo, junuldeliktado, rajto al pli racia edukado, drogkonsumaj problemoj, militrifuzantoj, k. t. p. povus esti sufiĉe antaŭtempe studitaj kaj preparitaj por internacia debato.

Z.E.J.

# AL LA LEGANTOJ DE "VALENCIA LUNO"

## KAJ SEJO-BULTENO

Tre estimataj samideanoj kaj amikoj:

Krankam al ni, Zaragozaj esperantistoj, tute ne plaĉas disputi inter ni, pro motivoj strikte etikaj, la publikigo de insidaj artikoloj en la Esperantaj bultenoj "Valencia Luno" kaj tiu de SEJO kontraŭ la O.K.K. de nia 43a HEF-Kongreso, devigas min, membro de tiu Komitato maljuste atakita, respondi al ili, celante, pli ol respondi al la personoj, klarigi faktojn kaj meti la veron en la ĝustan lokon kie ĝi devas esti, ĉar certe, la interpreto diable subjektiva de tiuj faktoj igas ĝin tute ne rekonebla en tiuj artikoloj.

Kiaj estis la insultoj, kiaj la ofendoj faritaj al la digna HEJS-Prezidanto kaj al la brilaj redaktoroj de tiuj bultenoj indikataj? Ni tuj rakontos al vi, karaj legantoj, nudajn faktojn, por ke vi mem prijuĝu la gravecon de la "ofendoj":

"Unua Ofendo" : Dum la Kongreso, ni devis averti la kongresanojn pri kelkaj ĝustigoj, ni do improvizis anonceton kiu, verŝajne, ne estis lingve ĝuste redaktita. La digna, inteligenta kaj neararpova HEJS-Prezidanto kiu legis ĝin, konsideris pli oportuna anstataŭ averti nin pri la eventualaj eraroj por la koncerna korektado, meti alian afiŝon ridindigantan nin. Ni, tute simple, diris al S-ro. Sancho (kaj madridaj respondeculoj tute konsentis kun ni) ke li ne bone agis, ke lia konduto ne estis dece esperantisteca, kaj ankaŭ ke la anonco kiun li proponis, laŭ opinio de akademiano, ankaŭ ne estis lingve ĝusta.

Tio estas kio okazis, kaj kion oni konsideras "netolereblaj insultoj". Niaj karaj, kiu insultis kiun? Pri kia respekto vi parolas?

"Dua Ofendo" : Por la partoprenantoj de nia Kongreso ni donacis gravan libron, kaj kiam la pakajoj de tiuj libroj venis en la Kongresejon, ni petis al kelkaj junuloj helpon por porti ilin ĝis la oficejo por disdonado. La afero estis tute simpla: se la eventuala helponto ne deziris akcepti nian peton, li povis diri, ne, mi ne volas, aŭ pli diplomate, mi ne povas, kaj punkton. Sed ne, oni preferis aperi kiel viktimoj kaj di-

ri ke oni konsideris ilin "ŝarĝazenoj"...ĉu vi scias kiom da pakajoj kiel tiuj ni devis portadi de unu loko al la alia dum la Kongreso, nur por servi al vi? Sendube multenombrajn, kaj tamen ni ankoraŭ ne konsideras nin "ŝarĝazenoj", aĥ...eble mi eraras ĉar via materio estas pli delikata ol la nia kaj kion ni faras vi tute ne povas fari, ĉu ne?

Kiom da insultoj vi ankoraŭ ricevis, nia kara Prezidanto kaj brilaj redaktoroj, kiujn vi ne sciis respondi kaj solvi ĉi tie mem, en la adekvata loko, kiel respondecaj kaj civilizitaj homoj, anstataŭ organizi fikampanjon malkuraĝan per kiu vi premias nin, kies sola kulpo estis strebi dum unu jaro por ke ĉiuj hispanaj esperantistoj kongresu en Zaragozo kiel eble plej bone? Verŝajne, ne plu estas aliaj "insultoj" ĉar vi ne mencias ilin. Ekzistis sendube eraroj kiujn vi rajtas mencii kaj efektive vi mencias, sed tion oni devas konsideri normala, fakte kelkaj el ili estas atribueblaj al la kutima organizado de antaŭaj Kongresoj, kaj certe ankaŭ al nia homa kondiĉo.

Ke ni ne helpis al la junularo? Se vi deziras esti respektata bonvolu esti iomete pli serioza, S-ro. Sancho, ĉu ne vere ke mi skribis al vi sufiĉe antaŭtempe petante vin prepari junularan programon? La respondo estis ke vi ĝin preparus dum la Renkontiĝo en Gandia, sed tie ankaŭ vi ĝin ne preparis, kaj estis je via alveno al Zaragozo, en la grava momento de la Kongreso kiam vi prezentis ĝin; ĉu malgraŭ tio vi ne ricevis helpon? Eble vi preferas tion ignori.

Kaj rilate al la kapablo de la junuloj pri kiu vi, brila redaktoro de la bulteno SEJO, tiel fiere parolas, des pli bone por nia movado, sed bonvolu esti iomete pli modesta kaj ne uzi piroteknikon ĉar ni ne estas nun en festoj: jam estas sufiĉe da dividoj en nia movado por ke vi "inventu" alian novan por junuloj kaj maljunulcjo. Duonlerta persono povas tuj kompreni ke ekzistas junuloj tre kapablaj, tute same kiel maljunuloj, kaj kompari ilin estas ja vera sensencaĵo...

Zaragoza junulo kiu legis vian malĝentilan artikolon, kara redaktoro de SEJO, diris al mi: "diru al tiu sinjoro, ke ni, la Zaragozaj junuloj,

post la sperto kiun ni havis kun tiu generalo kiu volis "savi" ĉiujn hispanojn, ne plu deziras esti "savitaj" de iu ajn alia. Ni ja malamas la "savantojn", li pretigu do siajn energiojn por aliaj kolektivoj, eble tre proksimaj al li, ĉar ni, junaj zaragozanoj, sufiĉas al ni. Se li deziras promocii sin, ke li forgesu nin".

Kaj fine mi deziras emfazi, ke mi tute ne pretendas ofendi niajn junajn amikojn, ke mia celo ne estas alia ol klarigi al niaj legantoj la veron, ĉar evidente ili tute ne pravas. Kompreneble mi, kiel Sekretario de la pasinta Kongreso, honeste laborinta por plibriligi ĝin, bedaŭras, ne la kritikojn sed la maljustajn atakojn ricevitajn. Mi pensas ke ni meritas alian premion pli justan al niaj streboj kaj al nia bona volo; se tamen mi, ofendis iun, mi publike petas senkulpigon.

Dankon.

SEKRETARIO DE LA 43a HEF-KONGRESO.

44a Hispana Kongreso de Esperanto okazonta en Sevilla, de la 7a ĝis la 12a de Julio 1.984a.

Informoj kaj Aliĝoj: O.K.K., strato Sol, 75.- SEVILLA-3

La Provizora Programo antaŭvidas: Seminarion pri Turismo, Fakajn Kunvenojn, Ekzamenojn, Laborkunsidojn de la Hispana Jubilea Komisiono kaj de HEF, Prelegojn, viziton al la Alkazaro, Folkloran prezentadon, Ekskursojn, k.t.p.

La temo de la Kongreso: Turismo.

Ĉiujn informojn rilatantan nian Movadon vi povas sendi al la respondeculo pri HEF-Informado: Enrique Piquero Vazquez, str. Asin y Palacios, 8.-6<sup>a</sup>-A. ZARAGOZA-9.



